ĉambro oftete bone videbla ĉe la maturaj aŭ submaturaj askoj, kun bone distingebla piedo kelkafaje sufice longa, bazparte duloba, J-, ŝajne dutunikaj (dehisko ne observita), enhavantaj sporojn ĝenerale po 4 (malofte 1 aŭ 2, tre malofte 8), enaske unuvicajn aŭ diagonalajn, malofte preskaŭ duvicajn.

Askosporoj unue senkoloraj, maturstadio brunaj, de (14)18–22,5–27(39) × (6)7–8,6–10(13) µm, kun rilatumo longo–larĝo (L/l) de (1,5)2,0–2,6–3,4(4,3) [laŭ 283 sporoj mezuritaj], komencevolue 0–septaj, poste (1)2–septaj, maturstadio 3–4–septaj aŭ eĉ submurecaj (kun nur unu septo laŭlonga aŭ oblikva), ĉesepte ne maldikiĝintaj, kun supraĵo aspektanta malfajne granula per fotona mikroskopio. En iuj specimenoj, inklude la tipon, observeblas kelkaj malgrandaj sporoj nur 10–17 µm longaj, subglobaj aŭ ovoformaj, 1–2–septaj aŭ neregule septaj, ne atentitaj en la statistiko de la spordimensioj. Sporparieto dika, sen metakromataj reakcioj age de la krezo bluo, konsistanta el pluraj tavoloj, de ekster al interno : ekstera perisporo formantaj halojn senkoloran kaj sengranulan; interna perisporo bruna, tre granula, precipite en la ekstera parto, kies supraĵo neegalas; propra parieto (= episporo) kaj endosporo senkoloraj, sengranulaj; septo kun septa lameno kaj toro bone videblaj ĉe la submaturaj aŭ maturaj sporoj. La sporogenezo montras la jenajn stadiojn : la plej junaj sporoj estas senkoloraj, unue senseptaj kaj kun parieto sengranula, poste eksteraparte ete granula. En dua stadio, la sporo daŭre senkoloras, sed estiĝas unu aŭ du septoj, neniam en la mezo de la ĉelo, sed en ties ekstremaĵoj. La tria stadio montras la aperon de pigmentiĝo, la pliiĝon de la granuleco kaj la disvolviĝo de tria aŭ kvara septo; en ĉi tiu lasta stadio la septa lameno kaj la toro aparte bone videblas, kvankam ili kelkafaje jam videblas en la dua stadio.

Rimarkoj

La ĉi-supra priskribo de *Pseudopyrenidium tartaricola* esence baziĝas sur detala studio de la specimeno el Usono, kompletigita per kelkaj detaloj observitaj sur la specimenoj el Rusio (vidu *Studitaj specimenoj*). Ni studis ankaŭ la tipon de *Verrucaria tartaricola*, tre malvastan, konservatan en la Brita Muzeo (BM), sed, por ne difekti ĝin, ni limigis nin je relative supraĵa ekzameno, tamen inkludanta sekcajon de peritecio jam sekciton. Ni konstatis, ke la plej multaj askosporoj de la tipo kongruas kun tiuj de la specimeno el Usono, kvankam ĉe la tipo abundas askoj, enhavantaj sporojn malbone kreskintajn kaj misformitajn, kio klarigas la mencion far ALSTRUP k HAWKSWORTH (1990) de du

développé, présentant une chambre oculaire assez souvent bien visible chez les asques matures ou submatures, à pied bien distinct, parfois assez allongé, bilobé à la base, J –, apparemment bituniqués (déhiscence non observée), contenant en général 4 spores (rarement 1 ou 2, très rarement 8) unisériées ou disposées en diagonales dans les asques, rarement presque bisériées.

Ascospores d'abord incolores puis devenant brunes à maturité, de (14)18–22,5–27(39) × (6)7–8,6–10(13) µm, à rapport longueur sur largeur (L/l) de (1,5)2,0–2,6–3,4(4,3) [d'après 283 spores mesurées], au tout début simples puis devenant (1)2–septées, à maturité 3–4–septées ou même submurales (avec un seul septum longitudinal ou oblique), non resserrées aux cloisons, à surface apparaissant comme grossièrement granuleuse en microscopie photonique. Dans certains spécimens, y compris le type, on peut observer quelques petites spores, de seulement 10–17 µm de long, subglobuleuses ou ovoïdes, avec 1–2 cloisons ou irrégulièrement cloisonnées, spores non considérées dans la statistique des dimensions des spores. Paroi sporale épaisse, sans réaction métachromatique avec le bleu de crésy, formée de plusieurs couches, de l'extérieur vers l'intérieur : périspore externe formant un halo incolore et non granuleux; périspore interne brune, très granuleuse, surtout dans sa partie externe dont la surface est inégale; paroi propre (= épisporo) et endospore incolores, non granuleuses; septum à lamelle septale et torus bien visibles chez les spores submatures ou matures. La sporogenèse montre les stades suivants : les spores les plus jeunes sont incolores, d'abord dépourvues de cloison et à paroi dépourvue de granules, puis légèrement granuleuse dans sa partie externe. Dans un deuxième stade, la spore est toujours incolore mais un ou deux septums apparaissent, jamais au milieu de la cellule, mais à ses extrémités. Le troisième stade montre l'apparition de la pigmentation, le renforcement de la granulation et le développement d'une troisième ou d'une quatrième cloison ; à ce dernier stade la lamelle septale et le torus sont particulièrement bien visibles, quoi qu'ils le soient déjà parfois au stade 2.

Remarques

La description de *Pseudopyrenidium tartaricola* ci-dessus est basée essentiellement sur l'étude détaillée du spécimen des U.S.A. et complétée par quelques détails observés sur les spécimens de Russie (voir *Spécimens étudiés*). Nous avons également étudié le type de *Verrucaria tartaricola*, très réduit, conservé au British Museum (BM), mais, pour ne pas l'abîmer nous nous sommes limités à un examen relativement superficiel, incluant cependant une coupe dans un périthèce déjà sectionné. Nous avons constaté que la plupart des ascospores du type concordent avec celles du spécimen des U.S.A., bien

specioj de sporoj. Niaopinie, la malgrandaj sporoj, men-
ciitaj de ALSTRUP k HAWKSWORTH (1990), subglobaj
aŭ ovoformaj, nur 10–17 µm longaj kaj 1–2-septaj,
verŝajne estas malbone kreskintaj sporoj, ĉar kvankam
ili ne ĉeestas en la specimeno el Usono, tiaj miskresk-
intaj sporoj ekzistas ankaŭ ĉe kelkaj specimenoj el
Rusio, kie ili estas tre malmultaj. Ni ne kalkulis kun tiaj
nenormalaj sporoj en la statistiko de la spordimensioj.
En la tipspecimeno ni observis ankaŭ kelkajn maloftajn
askojn, enhavantajn sporojn po nur unu aŭ du, neku-
time grandajn ($27\text{--}31 \times 8,5\text{--}10,5 \mu\text{m}$), submurecajn
(kun 1 aŭ 2 laŭlongaj septoj), misformajn kaj malbone
disigintajn dum la mejozo. ZHURBENKO (2001) indikas,
pri specimeno el la duoninsulo Kolao, dimensiojn eĉ pli
grandajn, $23\text{--}35 \times 10\text{--}12,5 \mu\text{m}$ (sporoj mezuritaj en K,
kiu povas pliigi la dimensiojn de mortaj sporoj).

La desegnoj de la figuro 45 de ALSTRUP k HAWKSWORTH (1990) montras precipite nenormalajn
sporojn kaj nur tri tipajn sporojn kun 3 aŭ 4 septoj.
Krome ĉi tiuj aŭtoroj ne priskribas la septogenezon ĉe
la sporo (vd *Priskribon de la specio*), kiu tre diferen-
cas de tiu de la *Weddellomyces* (NAVARRO–ROSINÉS k
ROUX, 1995) kaj de la *Pyrenidium* (NAVARRO–ROSINÉS k al., 2010, presata), genroj, ĉe kiuj la sporsepto
estiĝas samtempe aŭ la meza septo estiĝas unue (vidu
Diskuto).

La ornamo de la sporparieto de *Pseudopyrenidium tartaricola*, ege granula per fotona mikroskopio (fakte
mikromalglata), ne ja fajne veruketa kiel skribas ALSTRUP k HAWKSWORTH (1990), estas alia grava karaktero,
kiu diferencigas ĉi tiun specion disde tiuj de *Weddellomyces* kaj *Pyrenidium*.

Disvastiĝo kaj ekologio

Pseudopyrenidium tartaricola estas arkta–alpa spe-
cio, konata en kelkaj lokoj de Norda Eŭropo, Norda
Azio, Gronlando (vidu la tipon) kaj la Rokaj Montaroj
(Kolorado, Usono), kie ĝi kreskas sur la talo de pluraj
specioj de grundolögaj *Ochrolechia*. Sub la nomo *Wed-
dellomyces tartaricola*, tiun specion mencias SANTESSON
(1993), en la plej nordaj regionoj de Norvegio (Finn-
marko) kaj de Svedio (Norda Botnio kaj Laponio), sur
Ochrolechia androgyna kaj *O. tartarea*, kaj ankaŭ ZHUR-
BENKO k SANTESSON (1996) kaj ZHURBENKO (2001,
2007) en Arkta Rusio (duoninsulo Kolao kaj arkipelago
Francisko–Josefo), sur *Ochrolechia cf. frigida*. En ĉi tiu
laboraĵo ni mencias *Pseudopyrenidium tartaricola* unua-

que chez le type abondent des asques contenant des spores mal développées et déformées, ce qui explique la mention par ALSTRUP et HAWKSWORTH (1990) de deux types de spores. À notre avis, les petites spores mentionnées par ALSTRUP et HAWKSWORTH (1990), subglobuleuses ou ovoïdes, de seulement 10–17 µm de long et à 1 ou 2 cloisons, sont vraisemblablement des spores mal développées, car bien qu'elles ne se rencontrent pas sur le spécimen des U.S.A, de telles spores mal venues existent également sur quelques spécimens de Russie, où elles sont très peu nombreuses. Nous n'avons pas inclus ces spores anormales dans la statistique des dimensions des spores. Sur le spécimen-type, nous avons également observé quelques rares asques contenant seulement 1 ou 2 spores inhabituellement grandes ($27\text{--}31 \times 8,5\text{--}10,5 \mu\text{m}$), submurales (avec 1 ou 2 cloisons longitudinales), déformées et s'étant mal séparées lors de la méiose. ZHURBENKO (2001) indique, pour un spécimen de la presqu'île de Kola, des dimensions encore plus grandes, $23\text{--}35 \times 10\text{--}12,5 \mu\text{m}$ (spores mesurées dans K qui peut augmenter la taille des spores mortes).

Les dessins de la figure 45 d'ALSTRUP et HAWKSWORTH (1990) montrent surtout des spores anormales et seulement 3 spores typiques à 3 ou 4 cloisons. En outre ces auteurs ne décrivent pas la septogenèse chez la spore (voir *Description de l'espèce*) qui est bien distincte de celle des *Weddellomyces* (NAVARRO–ROSINÉS et ROUX, 1995) et des *Pyrenidium* (NAVARRO–ROSINÉS et al., 2010, sous presse), genres où les cloisons sporales apparaissent en même temps ou bien la cloison médiane apparaît en premier (voir *Discussion*).

L'ornementation de la paroi sporale de *Pseudopyrenidium tartaricola*, fortement granuleuse en microscopie photonique (en fait microrugulée), et non finement verrueuse comme l'écrivent ALSTRUP et HAWKSWORTH (1990), est un autre caractère important qui différencie cette espèce des *Weddellomyces* et des *Pyrenidium*.

Répartition et écologie

Pseudopyrenidium tartaricola est une espèce arctico–alpine connue dans quelques localités du nord de l'Europe, du nord de l'Asie, du Groenland (voir le type) et des montagnes Rocheuses (Colorado, U.S.A.), où elle croît sur les thalles de plusieurs espèces d'*Ochrolechia* terricoles. Sous le nom de *Weddellomyces tartaricola*, cette espèce a été mentionnée par SANTESSON (1993) dans les régions les plus septentrielles de la Norvège (Finnmark) et de la Suède (Botnie du nord et Laponie), sur *Ochrolechia androgyna* et *O. tartarea*, ainsi que par ZHURBENKO et SANTESSON (1996) et ZHURBENKO (2001, 2007) en Russie arctique (péninsule de Kola et archipel François–Joseph), sur *Ochrolechia cf. frigida*. Dans le présent

foje en kontinenta Ameriko kaj en Azio. *Ochrolechia inaequatula* estas nova specio de logato.

Diskuto

Kvankam supraje simila al specio de *Pyrenidium*, *Pseudopyrenidium tartaricola* notinde diferencas de ĝi pro hamatecio konsistanta ne el parafizoidoj distingeble branĉaj–anastomozaj kaj el perifizoj (nur el la ekstera formacio), sed el parafizoj simplaj aŭ preskaŭ simplaj, el perifizoj de la ekstera kaj interna formacioj kaj ankaŭ el mallongaj pseŭdoparafizoj. Ĝi diferencas de *Pyrenidium* ankaŭ pro sporoj kun parieto, enhavanta granulojn pli dikajn kaj lokiĝintajn nur en la interna perisporo (ankaŭ en la ekstera perisporo kaj en la propra parieto ĉe *Pyrenidium*), kaj pro spora septogenezo tre diferenca: la sporoj multe pli longtempe restas senkoloraj ol ĉe *Pyrenidium*, kaj ilia septigo, kiu pli malfrue okazas, kiam la sporoj preskaŭ atingas sian maksimuman grandon, estas de tre diferenca tipo, tial ke ĉe *Pyrenidium* la tri septoj samtempe aperas (kompreneble escepte de la reduktiĝintaj sporoj de la grupo de *Pyrenidium crozalsii*, kiuj havas nur unu septon, kiu estiĝas meze de la sporo). *Pseudopyrenidium tartaricola* distingebas de *Weddellomyces* ankaŭ pro interaskaj filamentoj, kiuj ne estas parafizoidoj sed parafizoj, kaj pro askuoj sen cefaloteciodaj platoj.

Kontraŭe *Pseudopyrenidium tartaricola* prezantas iujn esencajn karakterojn de la genro *Roselliniella*: askuoj kun hifaj alpendajoj, tamen notinde pli mallongaj ol tiuj de *Roselliniella* (MATZER k HAFELLNER, 1990); hamatecio identa (parafizoj simplaj aŭ preskaŭ simplaj, liberaj, mallongaj pseŭdoparafizoj kaj perifizoj de la ekstera kaj interna formacioj); sporoj brunaj kun parieto, kies supraĵo aspektas ege granula per fotona mikroskopio (fakte mikromalglata). *Pseudopyrenidium tartaricola* diferencas de ĉiuj specioj de la genro *Roselliniella* esence pro dutunikaj askoj diktolusaj kaj pro maturaj sporoj ĉiam plurseptaj aŭ eĉ submurecraj (kun kroma septo laŭlonga aŭ oblikva), akcesore pro hifaj alpendajoj malgrandaj kaj ne tre videblaj. En sia monografio MATZER k HAFELLNER (1990) ne indikas, ke la askoj de *Roselliniella* havas dikan toluson kaj apeksan okulusan ĉambron, kiuj kontraŭe estas bone videblaj ĉe *Pseudopyrenidium tartaricola*.

Pro hamatecio, konsistanta el parafizoj, mallongaj pseŭdoparafizoj kaj perifizoj, pro askoj dutunikaj kaj kies parieto supraparte dikiĝas en toluson, pro sporoj brunaj kun mikromalglata ornamaĵo kaj pro likenloĝeco

travail, nous mentionnons *Pseudopyrenidium tartaricola*, pour la première fois en Amérique continentale et en Asie. *Ochrolechia inaequatula* est une nouvelle espèce-hôte.

Discussion

Bien que ressemblant superficiellement à une espèce de *Pyrenidium*, *Pseudopyrenidium tartaricola* en diffère considérablement par son hamathécium formé non pas de paraphysoides nettement ramifiés et anastomosés et de périphyses (seulement de la formation externe), mais de paraphyses simples ou presque, de périphyses (de la formation interne et de la formation interne) ainsi que de pseudoparaphyses courtes. Il diffère également de *Pyrenidium* par ses spores à paroi contenant des granules plus gros et localisés dans la périspore interne seulement (également dans la périspore externe et la paroi propre chez *Pyrenidium*), et sa septogenèse sporale bien différente : les spores restent beaucoup plus longtemps incolores que chez les *Pyrenidium*, et la septation, qui se produit plus tardivement, lorsque les spores ont presque atteint leur taille maximale, est d'un type bien différent puisque chez *Pyrenidium* les 3 septums apparaissent simultanément (sauf bien sûr chez les spores réduites des *Pyrenidium* du groupe *crozalsii* qui n'ont qu'une cloison qui se forme au milieu de la spore). *Pseudopyrenidium tartaricola* se distingue des *Weddellomyces* également par ses filaments interasciaux qui ne sont pas des paraphysoides mais des paraphyses, ainsi que par ses ascomes dépourvus plaques céphalothécioïdes.

Par contre *Pseudopyrenidium tartaricola* présente certains caractères essentiels du genre *Roselliniella* : ascomes munis d'appendices hyphoides, toutefois nettement plus courts et moins visibles que chez les *Roselliniella* (MATZER et HAFELLNER, 1990); hamathécium identique (paraphyses simples ou presque, libres, pseudoparaphyses courtes et périphyses de la formation externe et de la formation interne); spores brunes à paroi dont la surface apparaît comme fortement granuleuse en microscopie photonique (en fait microrugulée). *Pseudopyrenidium tartaricola* diffère de toutes les espèces du genre *Roselliniella* essentiellement par ses asques bituniqués munis d'un tholus épais et par ses spores à maturité constamment pluriseptées ou même submurales (à une cloison longitudinale ou oblique), accessoirement par des appendices hyphoides réduits et peu visibles. Dans leur monographie MATZER et HAFELLNER (1990) n'indiquent pas que les asques de *Roselliniella* ont un tholus épais et une chambre oculaire apicale qui sont par contre bien visibles chez *Pseudopyrenidium tartaricola*.

Par son hamathécium formé de paraphyses, de pseudoparaphyses courtes et de périphyses, par ses asques bituniqués dont la paroi est épaisse en tholus au sommet, par ses spores

Pseudopyrenidium evidente afinas al la genro *Adelococcus*. Ĝi do lokeblas, almenaŭ en atendo de analizoj pri molekulara kladogenezo, en la familio *Adelococcaceae*, difinitan far TRIEBEL (1992), apartenantan al la ordo de *Verrucariales* kaj diferencaj de la *Verrucariaceae* pro parafizioj maturstadii daŭraj. *Adelococcus* distingebas de *Pseudopyrenidium* pro sporoj simplaj aŭ malofte unuseptaj kaj ĉi-okaze kun septo meza (MATZER k HAFELLNER, 1990 : 45, fig. 2), kaj pro askujoj sen hifaj alpendaĵoj.

STUDITAJ SPECIMENOJ — SPÉCIMENS ÉTUDIÉS

USONO — ÉTATS-UNIS D'AMÉRIQUE. Rocky Mountains, Colorado, Clear Creek Co., 1.9 km W of Silver Plume, sec. 23, 39°41' N, 105°44' W, alt. 2845–2900 m alt., 4 Sept. 1977, J. Poelt (GZU). [Sur le thalle d' *Ochrolechia cf. androgyna*].

NORVEGIO — NORVÈGE. Svalbard, Nordenskiöld Land, 7 km SSW of Barentsburg, 78°00' N, 14°12' E, alt. 15 m, dwarf shrub tundra, 15 July 2003, on *Ochrolechia frigida*, M. Zhurbenko 03261 (LE 233079); on *O. sp.*, M. Zhurbenko 03262 (LE 233089).

SVEDIO — SUÈDE. Torne Lappmark, 3 km SSW of Katterjäkk Station, 68°24' N, 18°08' E, alt. 650 m, on *Ochrolechia inaequatula*, 26 Aug. 1992, M. Zhurbenko 92467 (LE 233039).

RUSIO — RUSSIE. Kola Peninsula : 15 km N of Tumannyi, 69°00' N, 35°45' E, alt. 200 m, *Betula nana* tundra, on *Ochrolechia frigida*, 19 Aug. 1997, M. Zhurbenko 97332 (LE 233019); Barents Sea coast, 4 km SSE of Dal'nie Zelentsy, 69°05' N, 36°07' E, alt. 100 m, dwarf shrub tundra, on *Ochrolechia frigida*, 21 Aug. 1997, M. Zhurbenko 97331 (LE 232999); same coast, Dal'ne-Zelenetskaya Bay, 69°07' N, 36°05' E, alt. 10 m, dwarf shrub tundra, on *O. frigida*, 21 Aug. 1997, M. Zhurbenko 97329 (LE 232989); same coast, Olenka River mouth, 69°02' N, 36°24' E, alt. 50 m, dwarf shrub tundra, on *O. frigida*, 5 Sept. 1997, M. Zhurbenko 97330 (LE 233009); Khibiny Mts, headwaters of Kaskasnyuniok Creek, 67°46' N, 33°49' E, mountain tundra, on *O. frigida*, 18 Aug. 2007, M. Zhurbenko 0761 (LE 232166); headwaters of Ponoi River near Krasnoshchel'e, top of Nemetskaya Mt., 67°18' N, 37°05' E, alt. 250 m, on *O. frigida*, 18 July 1965, A. Dombrovskaya (LE 233069). — **Bol'shezemel'skaya Tundra**, Khar'yaga gas field, 67°11' N, 56°44' E, alt. 70 m, dwarf shrub tundra, on *O. frigida*, 21 July 2007, M. Zhurbenko 0724 (LE 232621). — **Yamal Peninsula** : Saletayakha River, 69°45' N, 68°40' E, *Betula nana* tundra, on *O. sp.*, 12 Aug. 1990, O. Khitun (LE 232868); Vaskiny Dachi at Bovanenkova gas field, 70°18' N, E 68°51' E, *Betula nana* tundra, on *O. frigida*, 27 Aug. 2007, D. Walker (LE 232797). — **Severnaya Zemlya Archipelago**, Bol'shevik Is. [all in polar desert] : E coast of Shokal'skogo Strait, 79°16' N, 101°40' E, alt. 20 m, on *O. inaequatula*, 12 July 1996, M. Zhurbenko 96890 (LE 233029); on *O. frigida*, 13 July 1996, M. Zhurbenko 96850 (LE 232761); Studenaya River, 78°37' N, 101°05' E, alt. 130 m, on *O. frigida*, 16 Aug. 1998, N. Matveeva (LE 232583). — **Taimyr Peninsula** : Ragozinka River mouth, 72°48' N, 80°53' E, alt. 20 m, *Dryas* tundra, on *O. frigida*, 12 July 1990, M. Zhurbenko 90614 (LE 233099); Byrranga Mts, Levinson-Lessing Lake, 74°33' N, 98°50' E, alt. 400 m, scree tundra, on *O. frigida*, 20 July

brunes à ornementation microrugulée et par son caractère lichénicole, *Pseudopyrenidium* se rapproche à l'évidence du genre *Adelococcus*. Il peut donc être placé, au moins dans l'attente d'analyses de phylogénie moléculaires, dans la famille des *Adelococcaceae* définie par TRIEBEL (1992), appartenant à l'ordre des *Verrucariales* et différent des *Verrucariaceae* par leurs paraphyses persistantes à maturité. *Adelococcus* se distingue de *Pseudopyrenidium* par ses spores simples ou rarement uniseptées et alors à septum médian (MATZER et HAFELLNER, 1990 : 45, fig. 2), ainsi que par ses ascomes dépourvus d'appendices hyphoides.

1995, M. Zhurbenko 95276 (LE 232818); same lake, 74°31' N, 98°27' E, alt. 450 m, scree tundra, on *O. frigida* var. *lapuensis*, 10 Aug. 1995, M. Zhurbenko 95275 (LE 232848); Byrranga Mts, Bol'shaya Bootankaga River, 74°17' N, 98°04' E, alt. 300 m, *Dryas* tundra, on *O. frigida*, 14 July 1991, V. Kuvaev (LE 232169a).

— **Lena River delta**, 3 km E of Krest-Tumsa Cape, 72°22' N, 126°42' E, alt. 50 m, *Dryas* tundra, on *O. inaequatula*, 4 Aug. 1998, M. Zhurbenko 98262 (LE 232808); Novyi Chai-Tumus cabin, 72°20' N, 125°40' E, alt. 20 m, dwarf shrub tundra, on *O. frigida*, 6 Aug. 1998, M. Zhurbenko 98270 (LE 232828). — **New Siberian Islands**, Kotel'nyi Is., Ostrov Kotel'nyi, 75°49' N, 137°42' E, tundra, on *O. frigida*, 15 July 1947, B. Gorodkov (LE 233059).

— **Wrangel' Is.**, headwaters of Gnilaya River, 71°25' N, 178°20' W, alt. 10 m, tundra, on *O. frigida*, 29 Aug 1998, S. Kholod (LE 232125). — **Chukchi Peninsula** : lower stream of Kymyneiveem River, 67°26' N, 175°25' W, alt. 30 m, *Eriophorum* tundra, on *O. sp.*, 13 July 1989, A. Katenin (LE 233049); Puoten Bay, 65°50' N, 170°30' W, dwarf shrub tundra, on *O. frigida*, 18 July 1972, I. Makarova (LE 232838).

DANKOJ — REMERCIEMENTS

Ni tre dankas al P. DIEDERICH (Luksemburgo) kaj D. TRIEBEL (Munkeno), kiuji critike kontrolis la unuan version de mia manuskripto, kaj al la kuratoroj de la herbarioj GZU (Graz) kaj BM (Londres), pro la pruntedono de la studitaj specimenoj. La laboro far la unua aŭtoro efektiviĝis en la kadro de la projektoj CGL 2007-66734-C03-02/BOS (*Ministerio de Educación y Ciencia, Gobierno de España*) et 2005SGR01047, GR-Criptogàmia (*Departament d'Universitats, Recerca i Societat de la Informació, Generalitat de Catalunya*).

Nous remercions très vivement P. DIEDERICH (Luxembourg) et D. TRIEBEL (München) qui ont relu d'une manière critique la première version de notre manuscrit. Nous sommes également redevables aux conservateurs des herbiers GZU (Graz) et BM (Londres) pour le prêt des spécimens étudiés. Le travail du premier auteur a été effectué dans le cadre des projets CGL 2007-66734-C03-02/BOS (*Ministerio de Educación y Ciencia, Gobierno de España*) et 2005SGR01047, GR-Criptogàmia (*Departament d'Universitats, Recerca i Societat de la Informació, Generalitat de Catalunya*).

BIBLIOGRAFIO—BIBLIOGRAPHIE

- ALSTRUP V. et HAWKSWORTH D. L. 1990.— The lichenicolous fungi of Greenland. *Meddr Grönland, Biosci.*, **31** : 1–90.
- KORF R. P., 1871.— Japanese Discomycetes Notes I–VIII. *Sci. Rep. Yokohama. nat. Univ., section II*, **7** : 7–35.
- LINDSAY L., 1871.— Observations on the lichens collected by Dr. R. Brown in West Greenland in 1867. *Trans. Linn. Soc. Lond.*, **27** : 305–368.
- LUMBSCH H.T. et HUHNDRÖF S. M. (coord.) 2007.— Outline of Ascomycota. *Myconet*, **13** : 1–58.
- MATZER M. et HAFELLNER J. 1990.— Eine Revision der lichenicolen Arten der Sammelgattung *Rosellinia* (Ascomycetes). *Bibliotheca Lichenologica*, **37** : 1–138 (+ 6 pl. h.t.).
- NAVARRO–ROSINÉS P. et ROUX C., 1995.— Le genre *Weddellomyces* (Dothideales, Dacampiaceae) en Catalogne et Provence. *Mycotaxon*, **53** : 161–187.
- NAVARRO–ROSINÉS P. et ROUX C. et DIEDERICH P., 2010 (sous presse).— Revisión taxonómica y morfológica del género *Pyrennidium* (Dothideales, Dacampiaceae). *Revista Catalana de Micología*.
- NAVARRO–ROSINÉS P. et ROUX C., 1995.— Le genre *Weddellomyces* (Dothideales, Dacampiaceae) en Catalogne et Provence. *Mycotaxon*, **53** : 161–187.
- SANTESSON R., 1993.— *The Lichens and Lichenicolous Fungi of Sweden and Norway*. SBT-förlaget, Lund. 240 pp.
- TRIEBEL D., 1993.— Notes on the genus *Sagediopsis* (Verrucariales, Adelococcaceae). *Sendtnera*, **1** : 273–280.
- ZHURBENKO M.P., 2001.— Lichenicolous fungi from Murmansk region of Russia. *Mikologiya i Fitopatologiya* (St.–Petersburg), **35** : 34–40.
- ZHURBENKO M. P. et SANTESSON R., 1996.— Lichenicolous fungi from the Russian Arctic. *Herzogia*, **12** : 147–161.
- ZHURBENKO M. P., 2007.— The lichenicolous fungi of Russia : geographical overview and a first checklist. *Mycologia Balcanica*, **4** : 105–124.